

STARTO

N-ro 2/2009 (231)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



foto Petro Chrdle

**Sabla Printempo en aprilo 2009 en Písek
Sekcio - kiel enkomputiligi videon**

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p/a Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea@esperanto.cz

Identec-numero (IĈ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: p/a Anna a Jiří Vyšínkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, pri informadiko

Komisiono de ĈEA: pedagogia

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

195 230 825 / 0300

Poštovní spořitelna Poděbrady

Komitato de ĈEA:

Prezidantino: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova8@seznam.cz (reprezentado de ĈEA, kunordigado, internaj asociaj rilatoj, metodiko)

Vicprezidanto (komitatano A de UEA): Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (internaciaj rilatoj, fakaj aplikoj de Esperanto, ĈEA-retkomunikoj, eldona agado)

Vicprezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, Tomecek@esperanto.cz (muzeo, konferencoj, TTT, ekster-asociaj rilatoj)

Sekretario: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz (protokolado, korespondado, rilatoj kun la banko)

Kasistino: Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz, 774 928 974 (membrobazo, kontado)

Komitatanino: Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavladvorakova@tiscali.cz (kluboj, projektoj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, malovec@volny.cz (sekcioj, komisionoj)

Ĉefdelegitino de UEA por Ĉeĥio kaj UK-perantino: Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828, Lucie.Karesova@seznam.cz

Kontrolgrupo de ĈEA:

Prezidantino: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 461 532 257, dvor.libuse@seznam.cz

Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 385 367, hirs@gm.vyskov.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 00 Pardubice, Ludmila.Srbova@seznam.cz

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Čuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

Kontrollegis: Sabine Hauge kaj Pavel Polnický

Strategia plano por antaŭenigi la lernejan instruadon de Esperanto

Ĉeĥa traduko de J. Drahotová troveblas ĉe
<http://egalite.freeweb.hu/strateg/stratcz.htm>

La *Internacia Laborgrupo por Antaŭenigi la Lernejan Instruadon de Esperanto (ALIE)* fondiĝis en majo de 2006, kun celo antaŭenigi la lernejan instruadon de Esperanto, unue en Eŭropo, sed poste – laŭ la akiritaj spertoj – ankaŭ en la tuta mondo. Por tiu ĉi celo kunlaboras instruistoj kaj instruantoj de Esperanto kun aliaj fakuloj. Ĉiuj membroj de nia Laborgrupo estas egalrajtaj, ili ĉiuj estas volontuloj, kiuj laboras laŭ siaj fortoj, talentoj kaj kapabloj. Nia Laborgrupo havas nek prezidantaron, nek membro-kotizojn, nek pagatajn dungitojn. Por plenumi specialajn taskojn elformiĝas *apartaj subgrupoj kunordigataj fare de spertuloj*.

Ĉiuj kunlaborantaj partneroj rajtas modifi la Strategian planon tiom, kiom la modifon postulas la leĝoj, eblecoj kaj kondiĉoj de la koncerna lando.

La strategiaj celoj de la **unua ŝtupo** de nia agado estas la sekvaj:

1. Ni devas atingi, ke almenaŭ en du trionoj de la eŭrop-uniaj kaj eŭropaj landoj estu minimume po 1-5 bazgradaj lernejoj, kie oni instruas Esperanton, kiel *unue lernendan, fremdan pontolingvon kaj kapablo-*

evoluigan lernobjekton.

2. Ni devas atingi, ke almenaŭ en du trionoj de la eŭrop-uniaj kaj eŭropaj landoj estu minimume po 1-5 mezgradaj lernejoj kaj/aŭ skoltaj/pioniraj taĉmentoj, aliaj junularaj organizaĵoj, en kiuj Esperanto estas aplikata kiel *relative facile alproprigebla ilo de interkultura kaj multlingva dialogo.*

3. Ni devas atingi, ke almenaŭ en unu triono de la eŭrop-uniaj kaj eŭropaj landoj estu minimume po 1 universitato aŭ altlernejo, *kie okazas instruado de Esperanto.*

4. Ni devas atingi, ke almenaŭ en unu kvarono de la eŭrop-uniaj kaj eŭropaj landoj estu minimume po 1 universitato aŭ altlernejo, kie okazas *trejnado de Esperanto-instruistoj.*

5. Ni devas atingi, ke la menciitaj bazlernejoj, mezlernejoj, skoltaj/pioniraj taĉmentoj, aliaj junularaj organizaĵoj, altlernejoj kaj universitatoj *aktive, kreive kunlaboru inter si.*

Nur post la plenumiĝo de la supre menciitaj celoj povas komenciĝi la **dua ŝtupo** de nia agado.

Por la realigo de nia strategia plano la sekvaj kondiĉoj necesas:

1. Bazgradaj, mezgradaj lernejoj, skoltaj/pioniraj taĉmentoj, aliaj junularaj organizaĵoj, altlernejoj, universitatoj, kiuj estas pretaj okupiĝi pri Esperanto.

2. Profesiaj lingvoinstruistoj trejnitaj ankaŭ por instruado de Esperanto
3. Motivitaj disĉiploj
4. Financaj rimedoj
5. Politika subteno
6. Internacia kunlaboremo
7. Internacie aplikeblaj lernolibroj kaj aliaj lerniloj

Niaj proponoj por krei la supre menciitajn kondiĉojn:

1. ■ En la unuaj du-tri jaroj de la **bazgradaj lernejoj** ni ne proponas instrui fremdajn lingvojn. Tiu periodo necesas por la alproprigo de la bazaj kapabloj, inklude la **gepatran lingvon** (kaj en tiu paroladon, legadon, skribadon, kalkuladon). En la sekvaj unu-tri jaroj ni proponas enkonduki specialan lingvolernigan lernobjekton por **optimume prepari la lernantojn** al la posta alproprigo de aliaj lingvoj. Por celoj de tiu ĉi kapabloevoluiĝo ni konsideras la plej konvena la instruadon de la internacia pontolingvo Esperanto, kiu ebligas konsciigi la lernantojn pri universalaj lingvaj elementoj kaj strukturoj (de la gepatra lingvo kaj aliaj lingvoj), donas okazon kun sukceso atingi bazajn komuniklertojn en la unue lernata fremda lingvo.

■ Poste, ĉirkaŭ la 12-a kaj 14-a vivojaroj ni proponas komenci la lernadon de po unu, libere elektita, nacia lingvo: unu "ŝatata lingvo" kaj unu "**disvastiĝinta mondlingvo**", - konvene al Raporto Maalouf pretigita por la Eŭropa Unio. Danke al la

kapabloevoluiĝa valoro de Esperanto la lernantoj dum lernado de tiuj ĉi tri lingvoj ĝis la abiturienta ekzameno povus ŝpari proksimume la tempon de unu laborjaro. En la tempo de la abiturienta ekzameno tiamaniere ĉiu junulo povos kompreni – krom sia gepatra lingvo – minimume meznivele tri fremdajn lingvojn. La efektiviĝo de tiu ĉi propono grandmezure helpus la konservadon de la unuopaj etnaj lingvoj. La ŝparitaj mono kaj tempo estus uzeblaj por evoluigo de aliaj, bezonataj kapabloj.

■ En la **mezgradaj lernejoj kaj ĉe skoltoj/pioniroj kaj aliaj junularaj organizaĵoj** ni proponas la lernadon de Esperanto kiel relative facile kaj rapide alproprigebla rimedo por **interkultura dialogo**. Ili estigu reciprokajn, partnerajn rilatojn kun aliaj, eŭropaj lernejoj kaj organizaĵoj, kaj kun po unu ekster-eŭropa. Tia kunlaboro ebligas jam dekomence, ke nia lerneja agado iom post iom atingos ĉiujn ekster-eŭropajn landojn de la mondo. La kunlaboro baziĝos sur interŝanĝo de informoj pri lingvaj, kulturaj, geografiaj kaj historiaj heredaĵoj de la koncernaj landoj. La gejunuloj – uzante kaj la "helikoposton" kaj la plej modernajn ilojn de la informteknologio – akiros eksterlandajn amikojn, ili spertos lingvan egalrajtecon, komprenos, respektos kaj akceptos la lingvan kaj kulturan diversecon. Ili povos kunlabori en preparado de komunaj ekspozicioj, retejoj, konkursoj, videokonferencoj,

ĝemelurbaj interrilatoj kaj internaciaj renkontiĝoj. *Ni konsideras precipe gravaj la personajn renkontiĝojn de la ĝejnuloj de diverslingvaj, najbaraj landoj.*

■ En la **universitatoj kaj altlernejoj** ni rekomendas instruadon de Esperanto kiel "**kataliza lingvo**" al la alproprigo de la klasika, latina-greka, scienca vorttrezoro kaj *al kreskigo de pli efika uzado de aliaj lingvoj.*

2. La trejnado de Esperanto-instruistoj estas nemalhavebla kondiĉo. Ni devas subteni tiujn universitatojn kaj altlernejojn, kiuj jam nun instruas la estontajn Esperanto-pedagogojn. Ni devas instigi la junajn studentojn de lingvistiko, krome la senlaborajn kaj pensiajn lingvoinstruistojn, ke ili alprenu Esperanton, kiel novan fakon. Ili ĉiuj tre facile kaj rapide povas alproprigi Esperanton ĝis la nivelo bezonata por instrui ĝin. Ni devas akcenti la valoron de la internaciaj diplomoj pri la instrukapablo.

3. Por lernemuloj ni laŭeble ĉiam argumentu per *praktikaj avantaĝoj de Esperanto*: internacia vorttrezoro, fonetika skribmaniero, relative facila gramatiko, ŝparo de tempo kaj mono, faciligo de la lernado de aliaj lingvoj, ĝia kreskanta apero en la Interreto kaj Vikipedio, lingva egalrajteco, ktp.

4. Por akiri financan bazon ni devas partopreni en eŭropaj kaj naciaj konkursoj. Ni devas organizi la ĉirilatan pluperfektigon de la membraro de nia Laborgrupo. Ni devas alpro-

prigi la teknikon de subvencipetoj. Ankaŭ la donacoj de privataj personoj (ekzemple en formo de lerniloj, subteno de studvojaĝoj, ktp.) povas esti grandsignifaj. Iom post iom devas aperi en la lerneja instruado de Esperanto ankaŭ la privataj entreprenoj, privataj lernejoj, do la privata kapitalo.

5. Grava parto de nia agado devas esti la akiro de politika subteno. Ni devas flegi kiel eble plej bonajn kontaktojn kun la politikistoj. La politikistoj, ĵurnalistoj kaj aliaj ŝlosilpersonoj de la diversaj komunumoj subtenos nin nur, se ni povos demonstri konkretajn rezultojn. Ni neniam forgesu pri la *pozitiva retrokuplo-efiko*. Ju pli multaj lernejoj instruos Esperanton, des pli multaj lernejoj volos imiti ilin kaj des pli multaj politikistoj deklaras siajn pozitivajn starpunktojn. Ni devas inviti la politikistojn al niaj aranĝoj, kaj regule informi ilin pri niaj plimalpli grandaj sukcesoj.

6. La plej grava elemento de nia agado devas esti la internacia kunlaboro. Per la helpo de Esperanto *la instruaj institucioj kaj entreprenoj povas komuniki kaj kunlabori*. Ni devas sisteme, efike demonstri la avantaĝojn de la esperantlingva komunikado inter la kunlaborantaj baz- kaj mezlernejoj, junularaj organizaĵoj, altlernejoj kaj universitatoj.

Budapest, la 30-an de junio, 2008.

Problemoj dum la dissendado de ĈEA-retkomunikoj

Kiel espereble vi ĉiuj scias, estas rete dissendata laŭbezone neregula reta informilo ĈEA-retkomunikoj, kiu informas pri aktualaĵoj, plejparte el la ĉeĥa parto de Esperantujo. Mi dissendas ilin ne nur al la rete atingeblaj membroj de ĈEA, sed al ĉiuj esperantistoj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri tio. Tial estas ankaŭ relative multaj abonantoj eksterlandaj.

La retkomunikoj neniam enhavas aldoniĵojn, do neniukaze pezigas la retkestojn.

Ĉi-jare aperis ĝis nun du numeroj, sed bedaŭrinde multaj abonantoj ne ricevis ilin, nek la antaŭan numeron. La kialo ne estas konata, tre verŝajne ilin forigas iuj spamfiltriloj.

Danke al la nova dissendoprogramo preparita de Marek Blahuš (al kiu mi nun publike dankas) nun eblos dissendi la ĈEA-retkomunikojn tiel, ke ili ŝajnos esti sendataj ne kiel grupa dissendo, sed kiel pluraj unuopaj forsendoj. Mi do esperas, ke per tio ili trairos al ĉiuj, kiuj troviĝas en la dissendolisto.

Mi do nun petas ĉiujn, kiuj ne ricevis ĉi-jare la ĈEA-retkomunikojn kaj deziras ricevadi ilin, ke vi anoncu vin ĉe chrdle@kava-pech.cz, por ke mi povu envicigi vin en la novan dissendoliston.

Petro Chrdle,
redaktoro de ĈEA-retkomunikoj

Subtenu E-lingvon kaj OS!

La ĉeĥa societo E-lingvo Brno havas sian retejon <http://www.elingvo.eu> jam en 7 lingvoj kaj nun klopodas fondi politikan partion *Občanská strana* (Civitana partio). Kial? Estas minimuma ŝanco eniri parlamenton de Ĉeĥio, tamen ĉiu partio rajtas ricevi kelkajn minutojn en televido kaj radio antaŭ ĉiuj balotoj, sekve ankaŭ ni havus ŝancon atentigi milionojn da spektantoj kaj aŭskultantoj pri la lingvaj problemoj de EU kaj pri niaj retejoj, kiuj pli detale klarigas eblajn solvojn per Esperanto en funkcio de E-lingvo. Ni bezonas mil subskribojn de plenkreskaj ĉeĥaj civitanoj por povi registrigi la novan partion. Se vi volas aŭdi pri Esperanto en televido, iru al <http://www.obcanskastrana.info/kestazeni/> kaj elŝutu formularon, kiun vi kaj viaj amikoj povas subskribi kaj sendi al Dr. Pavel Lehký, Lozíbky 1, 614 00 Brno.

Vizitu la retejon ankaŭ por akiri novajn argumentojn por aplikado de Esperanto en EU.

Eks-Lanĉovanoj kunvenos

La 57-a SET Lančov komenciĝas ĉi-jare iom malfrue, la 5-an de julio 2009, ĉar tiu dato falis al lundo. Tamen denove okazos tri etapoj po 14 tagoj (vidu Starton 1/2009, p. 29) kaj dum la lasta semajno renkontiĝos la iamaj tendaranoj kiel ĉiujare. Multaj intencas veni ne nur por tri tagoj, sed vere por la tuta semajno kaj subteni tiel la esperantistan etoson en la tendaro.

Pozvánka na konferenci ČES

Vážení přátelé,

výbor Českého esperantského svazu (ČES) si Vás dovoluje pozvat na konferenci ČES, která se bude konat ve Svitavách **ve dnech 9.-11. října 2009** v krásném prostředí Ottendorferova domu, sídle loni nově otevřeného Muzea esperanta. K dispozici nám bude velký historický kulturní sál pro plenární zasedání, 2 prostory pro oddělené programy, Libroservo a čajovna k posezení v úzkém kruhu přátel. Po celou dobu sjezdu je zajištěno celodenní stravování ve školní jídelně vzdálené asi 300 m od místa konání konference.

Účastníci budou ubytováni na internátu Obchodní akademie vzdálené asi 100 m od jídelny, 400 m od Ottendorferova domu.

Svitavy jsou bývalé okresní město na pomezí Čech a Moravy. Jsou křižovatkou cest mezi Brnem, Olomoucí, Hradcem Králové, Pardubicemi a Havlíčkovým Brodem. Jsou rodištěm Oskara Schindlera známého záchranou vězňů z koncentračního tábora. Jsou hlavně rodným městem Oswalda Ottendorfera – velkého mecenáše, který v době svého působení v New Yorku věnoval městu peníze na různé stavby. Jednou z jeho staveb je i „Červená knihovna“, ve které je Muzeum esperanta. Město bylo známé výrobou textilií a dřevoobráběcích strojů.

Páteční program bude již v 16:30 zahájen vernisáží III. výstavy „100 let esperantského hnutí mezi železničáři a dětská literatura“ v Muzeu esperanta a po večeri bude pokračovat prezentací připravovaného DVD ke 40. jubileu ČES, na němž budete moci shlédnout to nejzajímavější a nejcennější, co bylo v tomto období členy našeho svazu vytvořeno (ještě nyní máte i vy možnost přispět do jeho obsahu – viz výzva v jiné části tohoto čísla Starta).

Po pracovním jednání v sobotu dopoledne, zahrnujícím nejen zprávy o činnosti, ale i seznámení s novými možnostmi pro naše aktivity, budete mít příležitost po obědě absolvovat prohlídku historického centra města a následně dva volitelné semináře či promítání v hlavním sále. Paralelně bude probíhat v místní ZŠ tříhodinové počítačové školení pro úplné začátečníky, věnované založení a používání elektronické pošty a základům vyhledávání na internetu. Počet míst v učebně je omezen, proto si v případě zájmu nezapomeňte včas zarezervovat místo!

Večerní program je pro vás připraven v novém multifunkčním centru Fabrika v sousedství Ottendorferova domu. Kromě tradiční taneční zábavy, oživené mj. i vystoupením břišních tanečnic, pro vás připravujeme i úvodní krátký koncert klasické hudby.

V neděli dopoledne vám opět nabídneme tematické semináře a společný vzdělávací blok o esperantu na internetu se závěrečnou diskusí. Dle možností se budeme snažit poskytnout prostor i pro setkání a prezentaci sekcí, klubů a jiných zájmových skupin v rámci ČES – prosíme tímto o včasné zaslání vašich nabídek a požadavků.

Výbor ČES

Dua inaŭguro en Esperanto-muzeo

Sabate la 28-an de marto 2009 okazis en Ottendorfer-domo en Svitavy inaŭguro de jam dua ekspozicio, ĉi-foje „40 jaroj de ĈEA“ kaj „Esperanto kaj junularo“. Invitilo aperis en la loka kultura bulteno Lucerna, en la kablo-televido de Svitavy kaj en elsendo de Radio Pardubice, kie Libuše Dvořáková el EK Svitavy respondis demandojn de redaktoro.

La inaŭguron en la salono super la muzeo ĉeestis trideko da vizitantoj, plejparte esperantistoj, inter ili Liba Gabalda, ĉeĥa esperantistino vivanta en Parizo. La inaŭguron filmis kablo-televido kaj radio OK.

Vicprezidanto de ĈEA d-ro Petr Chrdle konatigis aŭskultantojn kun

historio de la ĉeĥa Esperanto-movado kaj de la nuntempa ĈEA, 40-jariĝinta, kvankam la movado nialande ekis en 1890 per la unua lernolibro de F. V. Lorenc. Daniel Mrázek, vicprezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Junularo, prezentis planojn de niaj junaj esperantistoj, precipe la someran 65-an Internacian Junularan Kongreson en Liberec (2009-07-18/25). Bonhumoran prelegon pri la grupo E-mental prezentis Vlasta Piščíková. Inter la unuopaj prelegoj violonis nelongajn melodiojn Jan Duda. Poste jam ĉiuj transiris al la muzeo mem, kie en vitrinoj kaj kadroj estas eksponitaj novaj objektoj el niaj kluboj kaj pri junularo.

La muzeo jam estas konata eksterlande, de kie venis pluraj gratuloj. P. Chrdle prelegos pri la muzeo en la germana Herzberg, la Esperanto-urbo.

Oktobre estos inaŭgurata tria

ekspozicio, dediĉita al 100-jariĝo de IFEF, kun infanaj desegnaĵoj pri fervojo kaj kun esperantlingvaj infanlibroj. **Ni petas esperantistojn pri prunto de tiaj libroj.**

Libuše Dvořáková



Plua ekspozicio en Moravské Budějovice



La februara ekspozicio en Ĉevalejo, la eksponejo de la Urba Kulturcentro, vekis intereson ĉe la estro de la loka Muzeo de Metioj, s-ro Kovář, kiu proponis eblon ripeti la ekspozicion en la muzeaj ĉambroj kiel rememoron pri la unua Esperanto-kurso en Moravské Budějovice antaŭ cent jaroj kaj omaĝo al Komenio, kies ideoj pri universala lingvo realiĝis en Esperanto.



La ekspozicio oponas al komisiono de EU por multlingveco, ke Eŭropo bezonas komunan eŭropan lingvon kaj ke Esperanto estus por la funkcio

de eŭropa lingvo la plej taŭga.



Laŭ broŝureto „Esperanto-movado en Moravio“ de Jaroslav Mastný (1914) la unuan kurson en Moravské Budějovice „en 1909 gvidis instruisto St. Marák“.



Sed laŭ konservita foto el 1908 la unua pioniro estis Josef Krumpholtz, identigitaj estis ankoraŭ kvar aliaj personoj, inter ili arkeologoj Palliardi kaj Vildomec. Eble la ekspozicio helpas identigi pluajn personojn. Pri la foto kaj ĝia historio rakontas artikolo en *Vlastivědný sborník Moravskobudějovicka* II/2008 (Historia-geografia artikolaro de la regiono Moravské Budějovice).



Maja renkontiĝo en Šumperk

Sabate la 16-an de majo 2009 organizis Esperanto-klubo Šumperk jam tradicion renkontiĝon. Kunvenis 22 esperantistoj el Česká Třebová, Pardubice, Prostějov, Přerov, Svitavy, Šumperk kaj Železný Brod.

Unue ili promenadis tra parko al la klubejo de Savarmeo, kie ilin la kapitanoj, geedzoj Jana kaj Mojmír Coufal, konatigis kun historio kaj nuna laboro de Savarmeo ne nur en Ĉeĥio, sed en la tuta mondo.

Poste ili trarigardis la urbon kaj survoje vizitis la novrekonstruitan klostran preĝejon de Anunciacio.

Posttagmeza programo pasis en bona etoso en la kafejo Patro. Samideano Janík havis mallongan prelegon pri sia vojaĝo tra Sudafrika Respubliko. Samideanino Dvořáková invitis ĉiujn al Infana tago kaj al Muzea nokto en Svitavy, L. Filipová al renkontiĝo en Chropyně kaj L. Angelová nome de sia patrino, s-anino Rýznarová, invitis nin al festo okaze de la 100-jariĝo de la klubo en Pardubice. Je la fino estis malgranda tombolo.

Libuše Hýblová

Memstara parto de la ekspozicio estas la nuntempa movado enlanda kaj eksterlanda, eldonaĵoj de KAVA-PECH. La ekspozicio daŭros ekde la 1-a de majo ĝis la 14-a de junio 2009.

Viktor Dvořák

Miroslav Malovec

Fotoj Vlastimil Smetana



Forpasis Kurisu Kei

Pri Kurisu Kei, japana bohemisto, esperantisto, honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, sed ankaŭ de Ĉeĥa-Japana Asocio kaj Universala Esperanto-Asocio, mi skribis en Starto 3/2007. En tiu artikolo mi priskribis mian lastan renkontiĝon kun tiu mia malnova amiko, malproksima geografie, tamen tre proksima home, kaj esprimis grandan admiron al li. Ja en sia aĝo de 97 jaroj li ne nur plu verkis kaj tradukadis, sed havis en sia kapo tiom da planoj, kion ĉion li ankoraŭ devas plenumi!



Kurisu Kei kun Eva Seemannová

Nun, post malpli ol du jaroj, mi skribas denove pri li, bedaŭrinde pli malgaje. Kurisu Kei forpasis la 18-an de aprilo 2009, tri monatojn antaŭ sia 99-jariĝo. Mi do almenaŭ koncize resumu kelkajn momentojn el lia vivo:

Kurisu Kei naskiĝis la 18-an de julio 1910, esperantisto li estas de 1930. Li aktivis en Japana Proleta

Esperantista Unio kaj pro siaj politikaj agadoj li pasigis entute 4 jarojn en malliberejo. De 1959 ĝis 1961 li vivis en Ĉeĥoslovakio, kie li agis kiel universitata instruisto de la japana. Li apartenas sendube al la plej fekundaj tradukistoj de la ĉeĥa literaturo en la japanan. Pli da detaloj de lia vivo kaj precipe de lia verkado oni povas trovi en la ĉeĥlingva verko „*Co mi dala česká literatura*“ (Kion donis al mi la ĉeĥa literaturo), KAVA-PECH, 1996, kiu estis instigita de miaj demandoj dum lia lasta vizito de Ĉeĥio okaze de la Universala Kongreso en Prago, post kiu mi havis honoron gastigi lin plian semajnon kaj akompani lin interalie al la oficejo de tiama ŝtatprezidanto Václav Havel aŭ al Ĉeĥa-Japana Asocio.



Kurisu Kei kun Stanjo Chrdlová

Mi certas, ke kvankam Kurisu Kei jam korpe ne plu estas inter ni, ke lia verkaro kaj la rememoroj al tiu admirinda persono restos senmortaj!

Petro Chrdle

Antaŭ cent jaroj naskiĝis František Kožík

La 16-an de majo 2009 pasis 100 jaroj depost naskiĝo de verkisto, poeto, dramaturgo kaj granda subtenanto de Esperanto František Kožík. Li naskiĝis en Uherský Brod kaj laŭ modelo de sia patro origine finstudis en Brno juron. Plie li studis en dramkonservatorio kaj en filozofia fakultato kaj post fino de militservo li decidis dediĉi sin al laboro en radio – unue en Brno, poste en Prago, kaj sekve dum 18 jaroj li agis ankaŭ kiel dramaturgo kaj scenaristo de Ĉeĥoslovaka filmo. Pensiuliĝo ebligis al li okupiĝi plentempe pri verkado – ĝis sia morto en 1997 li sukcesis krei ĝenre varian verkaron, kiu entenas pli ol 100 librotitolojn. Oni trovas inter ili lirikajn poemarojn, infanlibrojn, eseojn kaj felietonojn. Tamen ĝis nun plej multe aprezataj estas liaj biografiaj romanoj, ekz. *Největší z Pierotů* (*La plej granda inter Pierotoj*) pri fanca pantomimisto J. B. Debureau (en 2001 ĝin publikigis eLibrejo en Esperanto-traduko de Jiří Karen kaj Josef Vondroušek), kaj *Světlo v temnotách* (*Lumo en tenebroj*) pri Komenio (esperantigita de Zdeněk Rusín kaj Miroslav Malovec en 1992). Inter la aliaj ni menciuj *Básník neumírá* (*Poeto ne mortas*) pri portugala poeto Luis Camões), *Po zarostlém chodníčku* (*Sur herbokovrita pado*) pri komponisto Leoš Janáček, *Na křídle větrného mlýna* kaj

Neklidné babí léto (*Sur la aloj de ventmuelejo, Maltrankvila Sankt-Martena somero*) pri pentristino Zdenka Braunerová, *Miláček národa* (*Amato de la nacio*) pri dramverkisto J. K. Tyl, plie pri Cervantes, markizo de Sade, aktoro Eduard Vojan, pentristoj Josef Mánes kaj Jaroslav Čermák, verkisto Rudolf Těsnohlídek, pri imperiestro Karolo la IV-a k.a.

Rilate al Esperanto, inter 1933 kaj 1940 F. Kožík estis radioreĝisoro ĉe la Verda Stacio en Brno, elsendanta en Esperanto, membro de la aktora grupo TRAKT (kune kun sia unua edzino Zdenka Švabíková, Karel Höger, Vladimír Leraus, Jarmila Kurandová k.a.). Sukcese estis ludata lia teatraĵo *Sur rozoj sternite* (kiun li verkis kun B. Polách). Lia dua edzino Olga Horáková estas verkistino, kies dramon *Epizodo komenciĝas* elsendis Verda Stacio en 1949.

Se vi volas konatiĝi kun personeco de František Kožík pli detale, ne hezitu viziti ekspozicion estigitan omaĝe al lia centjariĝo, kiu videblos ĝis la 2-a de aŭgusto en Muzeo de J. A. Komenský en Uherský Brod. Kaj se ĝi tro foras por vi, vi povas almenaŭ serĉi en via loka biblioteko libron „František Kožík – tisíc slov o lásce“ (1998) de Alena kaj Olga Kožíkovy. En http://www.rozhlas.cz/praha/uslysime/_zprava/347240 vi povas aŭskulti interesan radioprogramon pri lia vivo.

PaDv

Kio okazis dum Sabla Printempo

La unuan semajnfino de aprilo okazis jam la 4-an fojon en la urbo Písek seminario Sabla Printempo, dediĉita jam tradicie al „Esperanto kaj Interreto“, ĉi-jare al ciferecigo (= ĉeĥlingve *digitalizace*) de E-dokumentoj. Eble la temo fortimigis iujn pro sia ŝajna fakeco, sed fakte ĝi estis taŭga ankaŭ por komencantoj. La aranĝo, organizata de la loka E-klubo „La Ponto“, estis ĉi-jare aprobita kiel oficiala aranĝo de ĈEA kaj ĝi okazis kunlabore kun Ĉeĥa E-Junularo kaj internacia junulara organizo E@I, kiu realigas pere de Esperanto diversajn interretajn projektojn (vidu www.ikso.net). La aranĝo jam la duan fojon sukcesis akiri financan subvencion de la urbo Písek el la Eŭropaj fondusoj - menciindas substreki, ke ĝi estis destinita ne por disvastigi Esperanton, sed por krei pere de Esperanto interretajn produktojn por subteno de la regiona turismo. Jen inspiro por nia agadstrategio – fari ion utilan pere de Esperanto por la ekstera socio povas ev. alporti al ni pli da atento, prestiĝo kaj subteno ...

Fine kunvenis en Písek pli ol trideko da komputilemuloj ne nur el tuta Ĉeĥio, sed ankaŭ el Slovakio, Germanio, Belgio kaj Francio. Praktika motivo por elekto de la ĉi-jara temo estis projekto pri eldono de jubilea DVD omaĝe al kvardekjariĝo de ĈEA kaj neceso teknike trejni kunlaborantojn por ĝi.

La partoprenantoj laboris paralele en tri grupoj, kiuj dimanĉe dum komuna sesio resumis kaj prezentis siajn rezultojn. Por ekzercado estis rekomenditaj

kaj trejnataj i.a. jenaj programoj, kiujn ankaŭ vi povas laŭinterese elprovi:

- 1) ciferecigo de tekstoj – programo por optika signorekono **Readiris Pro 11** – provversio por 30 tagoj senpage elŝuteblas en www.irislink.com (rubriko Download), prezo de la daŭre uzebla programo estas ekde sub 2.000,-Kč
- 2) prilaboro de ciferec(igit)aj fotoĵoj – **Irfanview** (www.irfanview.cz) kaj **PhotoFiltre Studio** (en www.stahuj.cz aŭ www.slunecnice.cz) – ambaŭ komplete senpagaj kaj ankaŭ en ĉeĥa lingvo-versio
- 3) komputila registrado kaj prilaboro de voĉo kaj muziko – programo **Audacity** <http://audacity.sourceforge.net/> - same komplete senpaga kaj en ĉeĥa lingvo-versio
- 4) prilaboro de fotoprezentoj kaj mallongaj E-videofilmoj – **Windows Movie Maker** (parto de programaro por Windows XP kaj Windows Vista)

Por iom senstreĉiĝi, krom komputila lernado restis tempo ankaŭ por printemp-etosa urbopromeno kaj projekciado de E-videofilmetoj kaj komuna kantado.

Krome, ĉiu aktiva partoprenanto ricevis kompaktdiskon plenplenan de utilaj materialoj ne nur pri ciferecigo, sed pri komputilumado kaj Esperanto ĝenerale. La KD estos reeldonita kaj por ceteraj interesiĝantoj favorpreze aĉetebla ankaŭ dum la asocia konferenco en Svitavy.

La aranĝo estas planata ankaŭ por la sekva jaro – jam nun ni antaŭĝojas bonvenigi ankaŭ VIN!

Interesiĝantoj pri la temo povas kontakti nin jam nun pere de

datumbazo@esperanto.cz.

PaDv

EKOTUR kaj EKOTURISMO

Ekotur estas ekoturisma renkontiĝo, kiun tradicie organizas Kongresa kaj Kleriga Agentejo de Petro Chrdle (KAVA-PECH). Ĉi-jare ĝi estos en iom nova mantelo, ĉar ĝi estos samtempe renkontiĝejo de AVE (Asocio de Verduloj Esperantistaj). Ĝi estos ĉiukaze internacia, eĉ interkontinenta renkontiĝo, pro jama aliĝo de partoprenantoj ne nur el Germanio kaj Francio, sed ankaŭ el Kanado.



Litomyšl

Sed unue mi respondu al ofta demando: Kio estas Ekoturismo? Mi mem renkontiĝis kun la termino Ekoturismo nur kiam estis flanke de OSN deklarita montaro Ŝumava „Pejzaĝo de la jaro (1999/2000) kaj pli detale nur post deklaro de „Jaro de ekoturismo“ (2002). Koncize, temas pri tiuj formoj de turismo, kiujn mi ĉiam ŝatis kaj praktikis, sed nomis simple „turismo“ (piedturismo, biciklado, surrivera kanuado, ski-turismado). Ĉar en „moderna“ lingvo sub turismo oni komprenas precipe suĉadon de mono el vojaĝantoj, ankaŭ malkaŝe parolante pri „turisma industrio“ aŭ

pri „parto de nacia buĝeto“, la ĉefa tasko de turismo laŭ tio do estas produkti gajnon. Tial oni fakte nove nomas la turismon en la senco de tiu, kiun praktikis la kluboj de turistoj jam ekde la 19-a jarcento – ekoturismo. Kiu volas ekscii pri ekoturismo pli detale, venu al Ekotur. Ĝi tamen ne estas unusola ekoturisma renkontiĝo en Esperantujo. Same alte mi taksas komunajn malsuprenirojn al Poludnica (SK) ĉiun unuan semajnfino de la jaro kaj Montkabanan Renkontiĝon organizitan de Kroataj esperantistoj ĉiuaŭtune, alterne en Kroatio kaj Slovenio. Eble ekzistas en Esperantujo ankaŭ aliaj, pri kiuj mi ne scias - sed mi revenu al la ĉefa Ekotur.



La unua en la vico de Ekoturoj estis en la jaro 2000 en Regiono de Mácha (Doksy) sub la nomo IBIRE (Internacia Biciklista Renkontiĝo, nur por biciklantoj, la dua en 2001 en la montaro Šumava (Kvilda) nur por piedturistoj, ekde 2002 denove IBIRE en Bohemia Karsto kaj Brdymontetaro (Dobřichovice) kaj ekde tiam estas komunaj renkontiĝoj por piedturistoj kaj biciklantoj kun komunaj vesperaj programoj: kaj klerigaj pri Ekoturismo, ekologio, geografio, kaj distraĵoj.



La ĉi-jara Ekotur okazos de la 22-a ĝis la 29-a de aŭgusto en Svitavy, do regiono sendube tre alloga por esperantistoj. Krom la vizito de la tiea Esperanto-muzeo oni esploros tiun Bohemian-Moravian limregionon: vizitos interalie la urbon Litomyšl, registrita ĉe UNESKO kiel kultura heredaĵo kaj ĉe esperantistoj fame konata pro romano de Karolo Pič „La Litomišla tombejo“, burgon Svojsín, „ĉeĥan Versailles“ Nové Hrady, kaj ankaŭ multajn naturajn vidindaĵojn, fronte de la rokaro *Toulcovy Maštale*

(staloj de Toulec) kaj lerniga vojo laŭlonge de la kresto kreanta historian limon inter Moravio kaj Bohemio. Oni vizitos ankaŭ savstacion por libere vivantaj bestoj, ktp. Ne temas pri sportaj konkursoj, sed pri ĝuo de naturo kaj historiaj vidindaĵoj – do la antaŭviditajn itinerojn oni povos laŭ siaj fortoj kaj emoj mallongigi aŭ male, sportemuloj, longigi.

Ankaŭ vesperaj programoj estos buntaj: Unu vesperon okazos publika kunsido de AVE, do niaj esperantistoj havos okazon ekscii pli pri tiu internacia naturamika Esperanto-organizo. Dum la ceteraj vesperoj estos prelegoj kaj diskutoj pri Ekoturismo, bioĝardenado, manĝeblaj floroj, verda ekonomiko, sekvo de plastaĵoj en akvo kaj certe venos ankoraŭ pliaj interesaj temoj, i.a. projekciado de filmoj subtekstitaj en Esperanto.

Ekotur finiĝos sabate la 29-an de aŭgusto tagmeze, sed eblas plilongigi la restadon je unu tago, por kio Pavla Dvořáková proponas seminarion pri utiligo de interreto por turismo.

Pli da informoj vi trovos ĉe www.kava-pech.cz/ekotur

Teksto kaj fotoj Petro Chrdle



Honoraj membroj de ĈEA

Petro Chrdle daŭrigas intervjuojn.

Věra Podhradská (1939)

Ŝi laboris en Kras Brno. En la asocio kiel komitatanino de ĈEA ŝi organizis konferencojn kaj similajn aranĝojn, engaĝis sin en SET Lančov.



UK 1996 Prago

1. Vi estis komitatano de ĈEA de ĝia fonda kongreso ĝis la pasinta jaro. Ĉu vi povas iom priskribi al ni la fondiĝon de ĈEA antaŭ 40 jaroj?

Kiel estas konate, la konstitua kongreso okazis en Brno (29. - 30. 3. 1969). En tiu jaro mi fariĝis simpla membro. Sed la kongreson mi ĉeestis. Tiam ĝi estis por esperantistaro granda festo, ĉar renaskiĝis Ĉeĥa Esperanto-movado. La kongreson partoprenis pli ol 400 esperantistoj el la tuta Ĉeĥio, kiuj tiun ĉi momenton atendis longan tempon (de la jaro 1952). Dum la inaŭguro la kongresanojn unue alparolis neforgesebla Josef Vondroušek kiel prezidanto de la E-klubo Brno kaj LKK. Grave

estis, ke la kongreson partoprenis oficialaj gastoj, ekz. reprezentanto de Ĉeĥa Ministerio de Kulturo, estro de la tiam Urbana Nacia Komitato kaj estroj de urbaj kulturaj organizoj, plue reprezentanto de UEA, AES ktp. Estis elektita 25-membra centra komitato, prezidanto fariĝis s-ano Josef Vítek. La celo estis renovigi Esperanto-movadon, disvastigi la internacian lingvon kiel rimedon de interkompreniĝo kaj internacia kunlaboro. Tuta traktado fluis en amika etoso, ĉiu partoprenanto estis preparita labori por la ideo en lokaj grupoj.

2. Kiun okazajon vi konsideras kulmino de via Esperanto-vivo?

Mi esperantistiĝis kiel 11-jara knabino. Mi estas tre dankema al mia unua kaj ĉefa instruistino s-ino Věra Borská – iama operkantistino, kiu al mi kaj aliaj junaj homoj montris vojeton al ideo de Esperanto, kiu tuj fariĝis mia granda dumviva hobbio. Ŝi alkondukis min ankaŭ al Esperanta vivo, mi konatiĝis kun multaj interesaj kaj gravaj personoj. Jam kiel 14-jara mi vizitis la unuan fojon Esperantotendaron, al kiu mi estas fidela ĝis nun. Kiel juna mi estis membro de Esperanto-junularo, precipe en Brno, kie tiam estis forta grupo. Aktivecon en ĈEA mi komencis dum la 2-a ĈEA-kongreso en Prago en la jaro 1976, jam de sekvanta kongreso en 1979 mi fariĝis vicprezidantino kaj de tiu tempo ĝis 2008 mi funkciis en



Kun Věra Borská en Verda Masko

estraro de ĈEA. Mia kulmino estis en jaroj 1999 - 2005 kiam mi ĈEA-n prezidis. Tiuj jaroj estis por mi decidpovaj kaj vere feliĉaj.

3. Pasintjare vi ne plu kandidatiĝis al la komitato. Sed certe vi ne forlasis Esperanton. Pri kio rilate Esperanton vi momente okupiĝas?

Kompreneble sen poresperanta laboro mi ne povus ekzisti. Nun mi kolektas materialojn pri meritplenaj kaj eminentaj esperantistoj por prilabori ilian literaturan portreton. Kiel multjara iama tendarano kaj kunorganizanto mi daŭrigas laboron por Somera Esperanto-Tendaro en Lančov. Nunjare jam estas la 57-a. Kvankam Esperanto en la tendaro ne regas, tamen ĝi senĉese apartenas al esperantistoj kaj espereble Esperanto al la tendaro iam revenos.

Ankaŭ en EK Brno kaj Societo por internacia lingvo mi funkcias kiel komitatano. Mi ankaŭ engaĝiĝas en la nove fondita societo E-lingvo.

Fine mi volas diri, ke Esperanto estas mia vivstimulo por ĉiam.

Josef Hron (1933)

emerita teĥnika oficisto, esperantistĝis en 1989. Dum multaj jaroj membro de Inspekta komisiono de ĈEA, komitatano de E-klubo D-ro Schulhof en Pardubice kaj de Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj, Kelkajn jarojn kompilanto de reta Granda Vortaro Esperanta-ĉeĥa.



1. Certe ankaŭ viaj organizaj laboroj, precipe ene de AEH kaj revizia komisiono de ĈEA estas meritplenaj, sed laŭ mi via ĉefa kontribuo por Esperanto estas kompilo de la plej granda Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa Esperanta vortaro kaj ĝia senpaga disponigo al ĉiuj uzantoj en la reto. Ĉu vi konsideras ĝin finita verko, aŭ ĉu vi daŭrigas tiun laboron?

Dankon por tiu ĉi opinio. Jes, kompilado de la vortaro postulas multe da tempo kaj spirita peno. Sed tiun laboron mi elektis memvole kiel plenigadon de mia libera pensiula tempo kaj pro tio ĝi estas por mi ĝojiga kaj kontentiga. Multaj nacioj jam antaŭ kelkaj jaroj disponis en sia lingvo pri diversaj tradukaj vortaroj direkte al aliaj nacilingvoj, grandece transigantaj limon de tiel nomataj "grandaj vortaroj", t.e. enhavantaj pli

ol cent mil vortparojn. Ĉagrenis min, ke neni el tiaj grandaj vortaroj direktis al Esperanto kaj malamikoj de nia lingvo povis dedukti, ke Esperanto ne disponas pri sufiĉe granda vortprovizo kaj do ne estas plenvalora lingvo. Tio estis kaŭzo, pro kiu mi origine provis kompili "grandan Esperanta-ĉeĥan vortaron". La afero ne estis tiom malfacila kiel antaŭe, ĉar mi jam disponis pri bona komputila aparataro kaj programaro, kiuj mian taskon ege faciligis. Kiam mi atingis starigitan "centmilan" celon kaj aperigis fakte unuan grandan vortaron Esperanta-nacilingvan sur interretaj paĝoj, mi decidis daŭrigi la laboron tiel longe, kiel mia sanstato tion ebligis al mi. Tiel mi pli-malpli ĉiujare vastigas la vortprovizon de la GVEĈ.

2. *Kiujn plej grandajn obstaklojn vi spertis dum la kompilado de la vortaro?*


En lumo de ĝojiga laboro mi prefere parolus pri solvataj aŭ solvindaj problemoj ol pri obstakloj. Granda Esperanta vortaro malkovras multajn problemojn de Esperanta vortprovizo, ĝis nun nesufiĉe solvitajn. Oni devas ekzemple kompletigi kaj ĝustigi terminologian bazon en multaj direktoj de homara penado, prefere en multaj laboraj fakoj. Estas multaj malbone kreitaj vortoj, multaj superflujaj sinonimoj, multege da terminoj mankas. Ankaŭ multaj Esperantaj vortoj ne havas en diversaj naciaj lingvoj identan signifon. La solvo ne estas

tasko por unuopulo, sed por tuta aro de vortaristoj, eĉ diversnaciaj. Kunlaborantojn kaj formojn de kunlaboro mi nun serĉas.

3. *Kiuj estas viaj plej proksimaj planoj rilate al Esperanto?*

Komence de julio ni solenos centjariĝon de Esperanto en Pardubice. Nia klubo D-ro Schulhof preparas tiuokazan renkontiĝon en proksima urbo Rybitví kaj ĝojatendas bonvenigi amikojn el tuta Ĉeĥa respubliko kaj ankaŭ el eksterlando.

Kiel multaj viaj legantoj scias, mi mem, en nomo de Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj, organizas buskaravanon al ĉi-jara Universala Kongreso en Bjalistoko. Estas jam kutime, ke tiuokaze ni al ĉeestantoj krom oficiala UK-programo proponas ankaŭ komunan ekkonon de la kongresurbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Certigi sukcesan transporton, loĝadon kaj ĉiĉeronadon por 36 aliĝintoj estas miaj nuntempaj ĉefaj zorgo kaj ĝojo.



Unu el la versioj de la Hron-vortaro

Jiří Patera (1935)

Lia poresperanta agado estas multflanka: krom funkcioj en la ĈEA-komitato kaj prezidanteco de praga klubo li verkas, tradukas Esperanten.



1. Kiel vi venis al Esperanto?

Pri Esperanto mi eksciis kiel 13-jara bubo el la porknaba gazeto Vpřed (Antaŭen), kie aperis kurso de Jan Filip. Poste, post kelkaj jaroj mi akiris lernolibrojn kaj vortarojn, mi aliĝis al la loka rondeto, kiun tiam gvidis gesroj Uhlík, mi partoprenis kurson gvidatan de ing. Čaklová, poste en EK Most aperis ankaŭ d-ro Josef Černý, tiutempe tre konata kaj aktiva esperantisto. Mi ofte vizitadis la E-klubon en la najbara urbo Teplice, kie aktivis Z. Rusín, ing. Gutmann kaj aliaj, kaj iam mi vizitadis ankaŭ la klubon en Ústí n. L., kie aktivis d-ro Novobilský, Jiří Kořínek k. a.

Sed mi ne devas forgesi, ke al mia esperantisteco multe helpis la E-

elsendoj de iuj radiostacioj; certagrade mi estas memlernanto, instruita de E-lingvaj radioelsendoj.

En 1977 mi transloĝiĝis en Pragon, kie mi eklaboris en la ĉeĥa Ministerio de financoj. Kaj tie mi tuj aliĝis al la Esperantista klubo en Praha. La klubajn kunvenojn tiam vizitadis ĉiusemajne 50 - 60 membroj, aktivis tie s-anoj Kynčl, Slanina, Nývlt, E. Seemannová, E. Urbanová kaj multaj aliaj. Mi estis komitatano, kultur-referanto, kaj mi zorgis pri prelegoj en la kunvenoj kaj pri eldonado de Bulteno.

Poste mi fariĝis por kvar jaroj eĉ redaktoro de Starto kaj ano de la estraro de ĈEA.


Inter la jaroj 1994 kaj 2003 mi estis prezidanto de la klubo, nun mi estas vicprezidanto.

2. Laŭ mi via plej granda ĝisnuna verko estas ĉeĥigo de la libro fare de Roman Dobrzyński *Zamenhofova ulice*. Kio estas por vi pli simpla tasko: esperantigi ĉeĥan tekston aŭ ĉeĥigi Esperantan?

Por mi estis granda honoro, ke mi povis ĉeĥigi la verkon de R. Dobrzyński „La Zamenhof-strato“ kaj en la UK en Florenco mi povis persone renkontiĝi kun Dobrzyński kaj mi eĉ kuraĝis premi la manon al la nepo de Majstro d-ro Zaleski-Zamenhof.

Estas malfacile diri, kio estas pli simpla tasko, tamen mi opinias, ke estas pli facile esperantigi ĉeĥan tekston, ĉar Esperanto estas tre mod-

lema lingvo, en kiu oni povas esprimi preskaŭ ĉion iel ajn kaj oni ĉiam povas trovi solvon de iu lingva problemo. Ĉehigi Esperantan tekston estas iom malpli facile, ĉar la ĉeĥa estas tre riĉa lingvo kaj tiu riĉeco iom limigas la esprimeblecon pro jam ekzistantaj frazeologiaĵoj kaj idiom-aĵoj. Se tiujn oni neglektas, oni povus ekhavi tradukon iom fremdan al la spirito de la ĉeĥa lingvo.



3. Krom viaj kontribuoj al Bulteno de praga E-klubo, kiun vi mem redaktas, mi ofte vidas viajn kontribuojn en La Gazeto. Kial vi kontribuas ĝuste al tiu gazeto?

Miaj kontribuoj al La Gazeto estas

fakte nur leteroj. Kun la geredaktoroj de La Gazeto mi konatiĝis en la OSIEK-konferencoj en Strážnice kaj en Prago kaj ĉar La Gazeto plaĉas al mi, mi sentas devon ĉiam skribi al ili kaj iel komenti iujn tekstojn en La Gazeto. Sed iam okazis, ke mia letero estis iom pli longa kaj tiam la redaktoroj aperigis ĝin kiel apartan artikolon por La Gazeto.

4. Ĉu vi povas diri kelkajn vortojn ankaŭ pri la praga E-klubo?


Bedaŭrinde nia Praga klubo nun troviĝas en nebona stato, niajn kunvenojn partoprenas kutime 10 membroj, ĵaŭde ni estis ses, el tiu unu gasto el Bulgario. Nia Bulteno do estas unu el signoj de vivado de la klubo, sed ĉar la aktiveco de la klubo ne estas granda, tial la Bulteno anstataŭ informoj pri agado enhavas literaturajn tekstojn, grandparte verkojn de ĉeĥaj pragaj aŭtoroj, kiuj iel simpatias kun Esperanto kaj ŝatas havi siajn tekstojn en la internacia lingvo; tiuj estas aŭ estis ges-roj Ludíková, Bergrová, Karen, Fousek, Vidman k. a. Mi ĝojas, ke ni havas novan kaj tre spertan originalan E-poeton kaj poemtradukanton s-anon J. Krolupper, kaj estas ĉi tie ankaŭ aliaj spertaj verkistinoj kiel P. Zemanová kaj H. Filová. Mi esperas, ke ankaŭ la praga junularo baldaŭ komencos verki, kiel tion jam faras Dan Mrázek.

Ĉu vi amas hundojn aŭ aliajn bestojn?



La retejo <http://www.zooplanet.cz> pri bestoj estas esperantigita kaj deziras kunlabori kun esperantistoj amantaj bestojn, precipe hundojn. Se vi pretas akcepti la kunlaboron, skribu al zilvar-petr@post.cz.

Sukeraĵfarejo Vyšinka proponas siajn produktojn ankaŭ en Esperanto: <http://www.vysi-sweet.cz>



Ĉambro de tribunalaj interpretistoj

en Ĉeĥio havas sian retejon esperantigitan danke al d-ro Zdeněk Rusín.
<http://www.kstcr.cz/eo/>

Rekomenditaj Esperanto-retpaĝaroj

www.google.com/intl/eo/ retserĉilo Google
www.esperanto-panorama.net

<http://www.tekstoj.nl/esperanto/tradligoj.htm>
Lingvoperfektigado kaj E-tradukado (Ni aparte rekomendas!)

www.lernu.net 12 senpagaj retkursoj (rekomendu al interesiĝantoj pri E-lernado!)

www.edukado.net retpaĝaro de ILEI
www.esperanto.cz retpaĝaro de Ĉeĥa E-Asocio

www.slovník.cz Granda vortaro de J.Hron
<http://mujweb.cz/Veda/traxler/vortaro.htm>

Meza Esperanta-ĉeĥa vortaro de Kraft-Malovec
<http://remush.be/etimo/etimoix.html>

Etimologia vortaro (deveno de la E-radikoj)

www.komputeko.net Komputila terminokolekto
<http://esperanto-jeunes.org/ravo/ravo.html>

Rimlisto (por tradukantoj de poezio kaj kantoj)

<http://bertilow.com/pmeg/> Bertilo Wennergren - Plena Manlibro de E-Gramatiko

<http://eo.wikipedia.com> - E-versio de interreta enciklopedio Vikipedio

<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/literaturo.html> Ampleksa arkivo de E-beletro

www.eventoj.hu/steb/ Sciencteknika biblioteko

E-novaĵportalo pri eventoj el la tut amondo (ne pri E-movado)

<http://www.gazetejo.org/> - pli ol 1600 gazet-numeroj de 110 Esperanto-gazetoj senpage

www.liberafolio.org - sendependa retbulteno pri E-movado

<http://mujweb.cz/Kultura/malovec/STARTO.htm> elektronika arkivo de la gazeto Starto

www.eventoj.hu/kalendar.htm - tutmonda kalendaro de E-aranĝoj

<http://www.esperantoland.org/eo/> - informoj pri E-aranĝoj, E-kursoj, E-grupoj

<http://radioarkivo.org> - arkivo de E-radioelsendoj de 29 stacioj

<http://farbskatol.net/> datumbazo de senpagaj videofilmetoj en Esperanto

<http://www.itvc.pl> internacia TV

<http://www.polskieradio.pl/podcast/39/podcast.xml> Radio Polonia

<http://www.ipernity.com/doc/97850/home/video> Kinejo de UEA

pd kaj mm

Esperanto-klubo La Ponto „Písek“ invitas vin al la



III-a Postferia renkontiĝo, **ĉi-foje en ĉarma sudbohemia urbeto Netolice**

kiam? **12.(-13.9.)2009**

Ni proponas al vi optimume kunligi renesancetosan turisman kaj kulturen programojn kun ebleco plu perfektigi en via lingvoscio de Esperanto!

Samtempe per via partopreno vi helpas fortigi pozicion de Esperanto en la urbo, kiu povas fieri pro esperantlingva retpaĝaro (vidu www.netolice.cz). Eblas variantoj kaj por nur unutaga, kaj por dutaga restado!

Programo:

Vendrede – por gastoj de malproksime – eblas alveturo vespere, neformala amika vespero, kun programo laŭ interkonsento

Sabate – Ĉefa programtago

9:30-11:00 Kleriga lingvoseminarieto en historia salonego de la urba muzeo

11:15-12:00 Trarigardo de la muzeo (kun eta serĉludo)

12:15-13:15 Komuna tagmanĝo

13:15-14:00 Promeno al la kastelo (3 km) aŭ peraŭta veturigo kaj babilado en la kastela refreŝiĝejo

14:00-16.00 Vizito de ĉarma renesanca kastelo Kratochvíle (kun nove aranĝitaj historiaj internoj kaj Esperante parolanta ĉiĉerono Petro Vok (Jan Řepa alias Fidel en historia kostumo) eventuale kun eta kultura surprizo

16:00 – Forveturo, daŭrigo de la lingva klerigado aŭ promeno sur instrupado ĉirkaŭ Netolice

Vespere - distra vespero kun ludoj kaj E-kantoj en historia gastejo



Dimanĉe

Antaŭtagmeze:

- 1) Trejnseminario pri tradukado de ĉiĉeronaj tekstoj (arkitekturo kaj arthistorio)
- 2) Paroliga E-seminario por kursfinintoj kaj tiuj, kiuj malofte havas okazon paroli Esperanton

Posttagmeze – forveturo aŭ laŭ intereso daŭrigo de la instruado aŭ ekskurseto (Arĥeoparko en Netolice aŭ la fama UNESKO-vilaĝo Holašovice)

Bus- kaj trajnkonektoj je 17:20 kaj 17:50 rekte gvidas trans České Budějovice al ĉiuj direktoj! (Prago, Strakonice, Písek, Plzeň, Brno, Jindřichův Hradec, Linz)

Kotizo enhavas kompletan programon (inkluzive instruadon kaj biletojn por la muzeo kaj kastelo), organizajn elspezojn, ricevotajn materialojn kaj tagmanĝon (ĉefpladon – kokidaĵon kun terpomoj, aŭ senviandan varianton – frititan fromaĝon kun terpomoj). Studentoj, senlaboruloj, handikapuloj kaj pensiuloj 180,-, laboruloj 240,-. Krompago por NEmembroj de ĈEA aŭ ĈEJ 60,-

Tranoktado:

unu tranokto 11./12. aŭ 12./13. – 180,- Kč, du tranoktoj (de vendredo ĝis dimanĉo) 290,- Kč en tranoktejo de la loka sporthalo (simplaj 2-3litaj ĉambroj kun lavujo kaj duŝejo; necesejoj komunaj) (event. pli koste en apartamento sur la placo - vidu <http://milan.brom.sweb.cz>). Dimanĉa matenmanĝo 30,- Kč. Ceterajn manĝojn ĉiu prizorgas kaj pagas memstare. Pagojn ni akceptos surloke. Kaze de nuligo de partopreno bv. laŭeble plej baldaŭ informi nin!

Bv. aliĝi ĝis 22.8.2009 ĉe:

Vladimír Türk, Tržní 521, 384 11 Netolice, Turk.V@seznam.cz

En via aliĝilo bv. esti indikitaj: via nomo, adreso, ret- kaj telefonkontakto, vegetarano jes-ne, tranokto: jes-ne, se jes: ĉu 11./12., ĉu 12./13 kaj kie, intereso pri traduka aŭ paroliga seminario, kiam kaj kiamaniere vi alvenos kaj forveturos, ĉu vi povas ev. kunporti homojn peraŭte. Vi ricevos ĝustatempe konfirmilon kaj precizigajn informojn. Ni antaŭĝojas pri via alveno!

El la kluba vivo

Brno. Ĉiun merkredon kunvenoj kun programeto (danĝera lingvo, Irlando, Belgio, Tajlando, virinoj en Afriko, 60 jaroj de Filip-vortaroj, Verda Stacio, ambasadoro en Aŭstralio, F. Pytloun kaj J. Vitek, svisaj lingvoj, efiko de humido je konstruaĵoj).

Mladá Boleslav kaj Mníchovo Hradiště: Esperanto-rondeto de d-ro Hradil, 12 membroj, kunvenoj merkrede je la 16-a horo. Lingvaj seminarioj en Skokovy, vizito de la urba astronomia observejo, preparado de legolibroj, tradukado el Esperanto, esperantigo de la urbaj retejoj, artikolado en gazetaro, kunlaboro kun AEH. Prez. J. Drahotová drahotova@esperanto.cz, sekr. M. Vaněk vanek@esperanto.cz, kom. M. Kolářová milada.mb@seznam.cz. Kluba retejo www.mlboleslav.cz/esperanto.

Moravské Budějovice. En la kastela Muzeo de Metioj ekspozicio „Omaĝo al Komenio – 100 jaroj de Esperanto en Moravské Budějovice“.

Písek. Sabla Printempo en aprilo, Maja „vojo al Budějovice“ merkrede la 13-an de majo 2009, Tria postferia renkontiĝo la 12-an de septembro 2009 en Netolice.

Polička. Sabate la 25-an de aprilo 2009, laŭ invito de la loka Esperanto-rondeto, alveturis al tradicia renkonto en Polička 27 partoprenantoj el diversaj lokoj de la respubliko. Unue ili vizitis la Urban Muzeon, el kies

novaj ekspozicioj estis la plej interesa tiu pri vitraĵoj el la regiono Horácko. La muzean koridoron ornamas 15 m longa reliefo de „knabina milito“ el 1901; la aŭtoro Vojtěch Šaff bildigis vizaĝojn de siaj parencoj kaj konatoj.



Ni provis benkojn de malnova klasĉambro, sur kiaj sidis en 1898 ankaŭ knabeto Bohuslav Martinů, infanoj povis ludi per modeloj de malnovaj domoj de Polička kaj la plej kuraĝa eĉ vestis sin per kiraso. Nova ekspozicio pri la komponisto Bohuslav Martinů priskribas liajn vivon, verkaron kaj afliktojn, estas tie ankaŭ libro donacita amike de Albert Einstein kun enskribita dediĉo. De la muzeo ĉiuj transiris al la lokaj fajrobrigadistoj, kiuj prezentis sian psike kaj fizike malfacilan laboron, novajn kaj ankaŭ historiajn fajrobrigadistajn maŝinojn kaj instrumentojn. Posttagmeze Marie Jílková rakontis pri sia laboro en Eŭropa Parlamento en Bruselo, pri la vivo en Belgio, pri ĝiaj belaĵoj kaj memorindaĵoj. Sekvis raportoj pri agado de kluboj. (*Libuše Dvořáková*).

Pardubice. De la 3-a ĝis 5-a de julio 2009 la klubo festos 100 jarojn de Esperanto en la urbo.

Praha. La 11-an de marto 2009 la Praga versio de ĵurnalo Metro publikigis artikolon „Renkonto sub turo en Jokohamo? – Preskaŭ sesdek jarojn ĉeĥino korespondis kun japano. Poste ŝi ekvojaĝis al li.“ Agata Kňourková ankaŭ klarigis al la legantoj, kio estas Esperanto.

Přerov. Jarkunsido la 18-an de marto 2009 en restoracio Pegas.



Svitavy. La 23-an de majo 2009 jam tradicia infana tago, la 13-an de junio „muzea nokto“ en Esperanto-muzeo, en aŭgusto okazos EKOTUR, en oktobro la asocia konferenco kaj malfermo de nova ekspozicio en la muzeo, en decembro „Marcipana



Kristnasko“.



Por la infana tago en Svitavy alveturis ankaŭ geknaboj el Pollando. La unua foto estis farita en la muzeo, la dua en la parko.

SEKCIOJ

Esperanto-sekcio de Asocio de Ĉeĥaj Filatelistoj ne estas sekcio de ĈEA, sed de neesperantista filatela organizo. Fondita la 18-an de oktobro 1969 laŭ iniciato de neesperantisto, sed filatelisto d-ro Josef Šolc el Hodonín. En la sekcio laboris Dolfá Bartošík, Vladislav Hasala kaj Vladimír Váňa.

Ĉu vi instruas Esperanton?

Sendu informojn al Jana Melichárková (melicharkova8@seznam.cz) pri via laboro por ebligi interŝanĝon de spertoj. Ni atentigas, ke dum IJK en Liberec eblas akiri atestilon pri lingvokapablo (ijk.ekzamenoj@esperanto.cz)

Ĉeĥa IFEF-sekcio

Fine de la lasta jaro okazis en Prago la 43a jarkonferenco de Ĉeĥa landa asocio de Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFEF). Partoprenis gastoj el Aŭstrio kaj Hungario. La konferenco elektis komitaton por trijara funkcia periodo: Pr Jindřich Tomášek, 1-a Vp inĝ. Ladislav Kovář, Vp Andrea Hasala, Sk PhDr. Anna Abelovská, Ks Ladislav Špína, TK-gvidanto inĝ. Zdeněk Polák, anstataŭantoj Jan Kukla kaj Libuše Filipová.

El la agado estas menciinda aktiva partopreno en la 60-a IFK en majo 2008 en la pola Poznano, kie estis honorita per Honora Diplomo de IFEF ankaŭ ĉeĥa membro Jiří Pištora por sia multjara agado, precipe kiel iniciatinto kaj longjara administranto de Fako Esperanto ĉe la Urba Muzeo en Česká Třebová.

Ĉeĥa delegacio partoprenis ankaŭ la solenan inaŭguron de la memorŝtono de IFEF apud la plantita arbo de IFEF (kverko) en Monda Parko de Esperanto en la pola urbo Malborko.

En junio okazis Printempa konferenco de Ĉeĥa l.a. de IFEF kun partopreno de eksterlandaj gastoj en la moravia urbo Prostějov kun riĉa programo. Okazis fakaj prelegoj kaj faka ekskurso al entrepreno DT - Trakforkejo kaj Maŝinejo, a.k., kie estas fabrikataj fervojaj trakforkoj kaj konstruciaĵoj ne nur por enlandaj kaj eksterlandaj fervojoj (ekz. Koreio, Svisio), sed ankaŭ trakforkoj tramaj, minejaj kaj kampaj, okazas renovigado de la fervojaj trakforkoj k.t.p.

Membroj de la sekcio helpis prepari kaj aktive partoprenis la solenan inaŭ-

guron de la Esperanta Muzeo en la urbo Svitavy (20.9.2008), kongreson de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en oktobro 2008 en la urbo Přerov kaj aliajn aranĝojn.

En faka programo de la jarkonferenco okazis interesa prelego fare de inĝ. István Gulyás (Vp de IFEF kaj Pr de Hungara Fervoja Esperanto-Asocio – HFEA) pri temo „Organizaĵo de UEA kaj kontinua agado de IFEF” (kiel unu el la plej fortaj, laborkapablaj organizaĵoj inter fakaj asocioj de UEA). Menciinda estas ankaŭ prelego de D-ro Petro Chrdle, la vicprezidanto de ĈEA, pri Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj ĝia agado. Okazis faka ekskurso al Urba Muzeo de Prago, kie oni interkonatiĝis kun interesaj ekspozicioj pri historio kaj nuntempo de la ĉeĥa ĉefurbo. La partoprenantoj interesiĝis precipe pri *Langweila modelo de Prago*, montranta aspekton de ambaŭ mezepokaj pragaj urboj – *Staré Město, Nové Město, Malá Strana* kaj Praga Kastelo antaŭ la vasta rekonstruado fine de 19a kaj komence de 20a jarcentoj.

Post la oficiala fino de la jarkonferenco oni dimanĉe ĉiĉeronis eksterlandajn partoprenantojn tra Prago kaj vizitis kelkajn vidindaĵojn de la urbo, ekzemple *Televituron de Žižkov* kaj *Rigardoturon de Petřín* inkluzive veturo per kablata transportilo al supraĵo de la elvidejo, kie interalie troviĝas speciala magia spegulara labirinto. La partoprenantoj de la preparata 63-a IFEF-kongreso en 2011 en la urbo Liberec, Ĉeĥio, kaj de la Postkongreso, povos viziti ĉi tiujn kaj aliajn vidindaĵojn de la ĉeĥa ĉefurbo.

Jindřich Tomášek

Blinduloj

Jen la konciza raporto pri nia renkontiĝo en Prago la 25-an de aprilo 2009. Ni estis sabate entute 14 personoj - membroj de la Sekcio de Blindaj Esperantistoj ĉe ĈEA kaj du akompanantoj kaj kiel gasto s-ano inĝ. Josef Krob, membro de AEH. Ni pridiskutis jenajn temojn:

* E-gazetoj en brajlo kaj sur kasedoj kaj en MP3: Esperanta ligilo, Aŭroro. Iomete ni aludis ankaŭ Starto-n.

S-ano Vychodil, administranto de EL konstatis, ke nuntempe abonas la organon de Ligo Internacia de Blindaj E-istoj preskaŭ 400 legantoj el 38 landoj.

S-ano Jiří Jelínek, redaktoro de Aŭroro, priparolis sian redaktan laboron kaj petis aliajn membrojn helpi al li pere de sendado de originalaj artikoloj aŭ de interesaj artikoloj el ĉeĥa blindul-gazetaro.

Oni krom alia priparolis eblecon enmeti pli malnovajn n-rojn de Aŭroro en MP3 en retpaĝaron de ĈEA. S-ano Příborský retletere proponis tion al s-ano Tomeček, la retpaĝara administranto, kiu konsentis pri la afero. Tadeo Karaš iom prilaboros registraĵojn kaj sendos ilin al s-ano Tomeček. Tiumaniere ĉiu interesiĝanto povos aŭskulti tre interesan enhavon de la gazeto.

* S-ano inĝ. Krob transdonis salutojn de s-anino Rýznarová, redaktorino de Informilo eldonata de AEH, kiu pro sanproblemoj ne povis partopreni nian renkontiĝon. Li informis nin pri

kelkaj aktivecoj de AEH, ekz. pri aranĝo de la regula E-seminario en Prago kaj pri renkontiĝoj de AEH-anoj en Skokovy. En junio okazos pli granda renkontiĝo de AEH-membraro en Pardubice.

* Pri ĉi-jaraj aranĝoj

Komence de julio partoprenos 6-membra grupo de sekciaj membroj la someran E-kurson en Aŭstrio, kiun aranĝas la Aŭstria Ligo de Blindaj E-istoj en Sankt Georgen.

De la 18-a ĝis la 24-a de julio ĉi-jare partoprenos 8-membra grupo Internacian kongreson de blindaj esperantistoj en Muszyna, Pollando. Ambaŭ aranĝoj estas jam sufiĉe pridiskutitaj kaj estis forsenditaj aliĝiloj, kiujn jam organizantoj konfirmis.

Ankaŭ ĉi-jare okazos la somera E-kurso en nia lando, kiun aranĝas la Regiona filio de SONS en Beskydy de la 15-a ĝis la 22-a de aŭgusto. Partoprenos verŝajne 12 blindaj esperantistoj el Ĉeĥio.

Komence de decembro ĉi-jara, eble la unuan sabaton, okazos regula antaŭkristnaska renkontiĝo de la sekcianoj en Olomouc kun provizora muzika prezento.

* S-ano Příborský informis pri preparota projekto fare de Braillo, kiu ebligos studi Esperanton pere de Interreto. La projekto koncernas vid-difektitojn – studantojn kaj instruistojn. Oni devas trovi iun spertan viddifektitan instruiston.

Jan Příborský

Máte elektronickou adresu?

Pokud ano a chcete-li být včas informováni, napište předsedkyni svazu melicharkova8@seznam.cz.

Korespondemuloj

■ Mi nomiĝas Ezechiel MUNGERI (naskita en 1952), loĝas en Karangara vilaĝo el distrikto Masisi / DRKongo en orienta regiono Kivu, Ugando.

Mi estas viro kun 7 infanoj, komentanto (pardonu erarojn). Vere, mi estas stebmaŝinisto, sed mi ne havas laboron, mi perlaboras iom da mono por nutri mian familion. Mi interesiĝas pri la naturo kaj legado. Kore via amiko nova Ezechiel MUNGERI, C/O PO BOX 08 BUNAGANA-KISORO/UGANDO. ezechielmungeri@yahoo.fr.

■ Mi estas studanto de animacio. Mia revo estas fari animaciajn filmojn en Esperanto. Ĝuste nun mi volas montri al miaj samklasanoj, ke ja ekzistas homoj el ĉirkaŭ la mondo, kiuj volas vidi novajn animaciaĵojn en Esperanto. Se vi subtenas mian revon, bonvolu sendi poŝtkarton al mi al jena adreso: Simmon Keith Barney, 1111 Pacific St, # 407 Vancouver, BC V6E 3X7 CANADA

■ ■ ■

Esperanto sur 64 milionoj da balotiloj

Laŭ decido de la balota komisiono de la 10-a de aprilo 2009, la germana sekcio de la politika movado "Eŭropo – Demokratio – Esperanto" (EDE) rajtas partopreni en la Eŭropaj Balotoj 2009 en Germanio. Tio signifas, ke ĝis la komenco de junio la germana ŝtato presigos almenaŭ 64 milionojn da balotiloj, sur kiuj troviĝas ĝia nomo kaj ankaŭ la nomoj de la 10 kandidatoj de EDE-Germanio – kun prof. d-ro Reinhard Selten sur la unua loko. EDE starigas listojn ankaŭ en ĉiuj regionoj de Francio, tiel ke entute ĉ. 108 milionoj da eŭropanoj (64 milionoj en Germanio kaj 44 milionoj en Francio) havos la eblecon subteni la disvastigon de Esperanto per sia voĉo. Dum en Germanio ĉiu voĉdonanto aŭtomate trovos EDE sur la balotilo, en Francio oni bezonas specialan voĉdonilon. EDE planas presigi kaj disdoni 7 milionojn da ili, kaj krome oni proponos la eblecon elŝuti ilin el interreto.

laŭ Ulrich Matthias

Venu al Chropyně

Sabate la 13-an de junio 2006 la klubo en Přerov invitas vin al Chropyně je la 10-a horo ĉe la fervoja stacidomo, de kie ni iros al la kastelo. Kunprenu botelon por kuraca akvo. Eblas viziti ankaŭ naĝejon. Aliĝu ĉe: Antonín Krejčíř, K Záložně 193/39, 751 02 Troubky, tonda.krejcir@seznam.cz.

EL NIA LETERKESTO

Mi legis – kaj mi rezonas (*je la artikolo „Ni legis kaj korektis“, STARTO/230/09*)

Certe ni ĉiuj „pekas kontraŭ la Fundamento“, do ni ne maldanku al J.W., ke li atentigas nin pri niaj eraroj. Klarigadi ĉi tiajn aferojn ne estas harfendado – ĝi estas nur objektiva, de la spertulo nepre – klarigado. Li devas antaŭ lernantoj „sterni“ tion, ĝis kiam ekzistas la koncernaj paragrafoj en la koncernaj gramatik-libroj. Pro tio ni ne koleru!

1. Mi estas certa, ke ni ĉiuj uzadas kaj plue uzados la „dum“ ankaŭ en la senco de „**ne plena daŭro**“, kiel tion postulas la Fundamento, kaj klarigas la § 193, PAG, 1985, (kaj malgraŭ la atentigoj en la „lingvaj anguletoj“ de J.W. en INFORMILO). Igas nin al tio ia „interna logiko“, kiu kontraŭstaras la formuladon: **en UK, ĉe UK, okaze de UK.** (??) Ĉu finfine la paragrafo(j) ne submetiĝos al la uzo, kiel okazis

2. en la kazo „dank' al...“ ? (b.v. ne ĵeti ŝtonojn al mi, eĉ ne vortajn)

3. Prave diras la proverbo, ke „eĉ la majstro...“ Tion dokumentas la punkto 13 (de la menciita artikolo). Kie J.W. uzis la esprimon „**pli korekte**“ tute „malkorekte“ – do malĝuste! Des pli „ironias“ la afero en spegulo de lia lingva anguleto – INFORMILO 7-8/2008, kies titolo estas **Ne korekta, sed ĝusta respondo**. En la teksto mem troviĝas precizigo „**korekte** není „správně“... (Rim. Mi kompreneble scias, ke en la STARTO-a artikolo

okazis malatento de J.W., ne lia nescio).

4. (Rilate al la punkto 11). Pri „personulo“. Ne nur en la propono de J.W. mi ĝin legis. Kaj ĝi plaĉas al mi. Mi opinias, ke la vorto estas bezona por esprimi ĝuste la vorton „osobnost“. Ĉu ĉiu, kiu estas „osobnost“ estas: *eminentulo, gravulo, famulo?*; estas eĉ homoj ne ĉiam enhavantaj noblajn (person)ecojn („rozporuplné osoby – osobnosti“), sed tamen ili estas siasence „personuloj“. Kiel ni esprimu: „Jam kiel infano li estis forta ...??“.

Ĉar tio ne estas (ankoraŭ) vortara vorto, oni povas uzi aŭ neuzi ĝin. Dependas de nuanco kaj vortosenkapablo de la uzanto. (Almenaŭ ĝi fariĝos ŝatata kiel „konato – konatulo“. Eble nenia pli grava peko!).

Redaktora rimarkigo: La vorto „personulo“ aperis en Minnaja-vortaro 1996, en Krause-vortaro 1999, sed en Krause 2007 ne plu.

Resume: Fine (ne „finfine“!) en STARTO „startis“ valora „lingva anguleto“. Valora pro tio, ke oni povas aŭskulti „ambaŭ flankojn“, kaj ĝui kaj lerni de ties konfrontado. Finfine! montriĝas, ke la pekoj ne estas tiel gravaj, kiel ilin „sternas“ la „unua flanko“ – kaj ke la rezonoj de la „dua flanko“ estas same kompetentaj, kaj al ni, legantoj, taŭgaj por lerni el ili. Per tio mi volas diri – la „lingva anguleto“ fariĝu en STARTO regula. Kaj regu en ĝi milda kaj amikeca etoso! (Konfrontadi oni povas ankaŭ tiamaniere, ĉu ne?)

Margit Turková, 7.4.09

KALENDARO

2009-05-13 *Maja vojo al Budějovice*
2009-05-16 *Printempa renkonto Ŝumperk*
2009-06-13 *Renkonto en Chropyně*
2009-07-03/05 *100 jaroj de Eo en Pardubice*
2009-07-05 - 2009-08-15 *Somera Esperanto-Tendaro Lančov, info@set-lancov.cz*
2009-07-18/25 *65-a Internacia Junulara Kongreso en Liberec*
2009-08-22/30 *EKOTUR, tradicia turisma renkontiĝo de biciklantoj kaj piedturistoj*
2009-10-09/11 *Konferenco de ĈEA en Svitavy*
2009-10-12/18 *InPaSem, Dobřichovice*
2009-11-06/08 *Terminologia seminario Dobřichovice*
2009-12-12 *Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek*
2010-09-09/11 *Simpozio okaze de 50-jariĝo de Esperanto-Klubo en Česká Třebová*

Ni kondolencas

- la 13-an de marto 2009 forpasis
Zdeňka Hršelová el Brno (*1932)

Legio de Bona Volo

jam 60 jarojn helpas al infanoj kaj instruas al ili ankaŭ Esperanton. Vidu:
<http://www.boavontade.com>

Lorenz kaj Remek

Merkrede la 13-an de majo 2009 Pavel Polnický ĉeestis en loka gimnazio de Čáslav prezentadon de studentaj laboroj. La unua priskribis biografion de F. V. Lorenz, kiu naskiĝis en proksima vilaĝo Zbyslav kaj kvar jarojn studis en tiu ĉi lernejo. P. Polnický cirkuligis almanakojn Lorenz, „Diverskoloran bukedeton“ kaj kelkajn gazetojn kaj ricevis interesan DVD. Sekva prezento koncernis kosmonaŭton kaj EU-parlamentanon Vladimír

Remek, kiu en Čáslav abiturientiĝis. Ĉar li mem partoprenis, P. Polnický demandis lin pri lingvaj problemoj en EU. V. Remek opinias – kvankam li mem ĝin ne posedas –, ke venkos la angla.

Ni atendas viajn kontribuaĵojn por la jubilea asocia DVD!

9.9.2009 estas limdato por akcepti kontribuaĵojn, kiuj povus aperi en DVD eldonota omaĝe al kvardekjariĝo de ĈEA. Ĉu vi posedas valorajn manuskriptojn aŭ antaŭlonge eldonitajn tekstojn, verkitajn de vi aŭ de aliaj ĈEA-(eks)membroj, kiuj meritas esti (re)aperigitaj? Ni daŭre serĉas valorajn kaj ankoraŭ nun legindajn E-tekstojn (instrumaterialojn, gazetartikolojn, beletron, fakajn studojn, ĉiĉeronajn materialojn), muzikmaterialon, sonregistraĵojn, fotojn, mallongajn videofilmojn, kiuj estiĝis en Ĉeĥio aŭ de ĉeĥaj esperantistoj dum la lastaj 40 jaroj.

Krome ni serĉas kunlaborantojn por komputila prilaboro de materialoj (retajpado, kontrolado kaj korektado de enkomputilitaj tekstoj, skanado de fotajoj, enkomputiligo de kasedoj ktp). Solena prezento de DVD okazos dum la ĉi-jara ĈEA-konferenco en Svitavy. Viajn proponojn aŭ jam enkomputilitajn materialojn bv. sendi al:
pavla.esperanto@gmail.com,
paperformajn materialojn al Pavla Dvořáková, Gregorova 2563,
397 01 Písek.

Ni elkore antaŭdankas kaj antaŭĝojas pri viaj sendaĵoj!

Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte **tiskopis VKLAD**, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu**: 195 230 825/0300, **variabilní symbol**: má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Další pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete L. Hýblové seznam, za koho platíte. **Konstantní symbol** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřížek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku.

Seznam čísel (variabilní symboly):

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50200** sekce železničářů IFEF
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 86-7290070227/0100
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio

Upozornění

pro sekce, kluby a kroužky ČES

Občanská sdružení jsou podle vyhl. 634/2004 Sb. osvobozena od placení poplatků za ověření

listiny - t.j. položka 4 - a za ověření podpisu - t.j. položka 5.

Zájemci o časopisy

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz. Předplatné uhradíte na účet u České spořitelny v Poděbradech, č. ú. 0017 011 013/0800, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 990,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 590,-Kč
La Gazeto: 600,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

La Ondo de Esperanto: 580,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 350,- Kč.

Juna Amiko: 260,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 32 stran formátu A5

Literatura Foiro: 1040,- Kč (*700,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

Heroldo de Esperanto: 1130,- Kč (*760,- Kč), v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A 3

Femina: 700,- Kč (*460,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

Litova Stelo: 290,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

*označená cena v závorce platí pro předplatitele mající esperantské občanství (v organizaci „Esperanta civito“)

Periodikum Českého esperantského svazu - 40. ročník

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:

**p/a Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789
62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz,
tel. 774 928 974**

Uzávěrka příštího čísla: 15.8.2009

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -
- 40-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

Abonprezo: 10 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

Ĉeĥio, malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva numero:
15.8.2009**

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

Aktualita

Knížka Marie Dolistové "Paní Zdislava z Lemberka" včetně esperantského překladu Z. Rusína je objednatelná na adrese: Marie Dolistová, ul. Přítkovská 1469/16, 415 01 Teplice. Cena: 60 Kč + poštovné.

Máte zájem o zahraniční knihy v esperantu?

Náš svaz může zprostředkovat nákup esperantských knih z UEA s tím, že svazu zaplatíte v Kč, i když jsou ceny uvedeny v eurech. Sdělte na adresu redaktora Starta, zda máte o tuto službu zájem, o jaký typ literatury, případně objednejte konkrétní knihy.

Nejnovější nabídky z katalogu UEA:

Medicina leksikono esperanta-franca kaj franca-esperanta, André Cherpillod (9 EUR)

Tigro – ĝia vivo kaj morto, Vojaĝaj rakontoj. Albertas Laurinčiukas (8,10)

Paŝo post paŝo ĉirkaŭ la mondo, Mária Kriszt (15,30)

Marvirinstrato, prozo originala, Tim Westover (10,80)

Rusa-Esperanta biblia frazaro (18)

Jesa, originalo, István Nemere (18)

Kavaliroj de kvardek insuloj, Sergej Lukjanenko (18)

Další knihy možno najít na adrese:

<http://katalogo.uea.org/>

podle kategorií, které vás zajímají.

Přihláška na konferenci ČES ve Svitavách ve dnech 9.-11.10.2009

příjmení: titul:

jméno: číslo legitimace:
(členové ČES)

adresa
ulice:

PSČ místo

email: telefon

číslo cestovního dokladu/OP: vegetarián: ANO / NE
chci ubytovat s: (pro stravující se)

Přihlašuji se závazně na **konferenci Českého esperantského svazu 2009 ve Svitavách**
a zavazuji se uhradit účastnický poplatek ve výši (zaškrtněte právě jednu možnost):

základní účastnický poplatek	<input type="checkbox"/>	300 Kč
zvýhodněný účastnický poplatek pro členy ČES	<input type="checkbox"/>	200 Kč
čestný člen ČES, nevidomý člen ČES, člen ČEJ	<input type="checkbox"/>	0 Kč

a současně objednávám následující ubytování a stravování (zaškrtněte požadované):

večeře v pá 9.10.	<input type="checkbox"/> 80 Kč		
ubytování v pá 9.10. v pokoji	4lůžkovém <input type="checkbox"/> 200 Kč	3lůžkovém <input type="checkbox"/> 230 Kč	2lůžkovém <input type="checkbox"/> 250 Kč
snídaně v so 10.10.	<input type="checkbox"/> 30 Kč		
oběd v so 10.10.	<input type="checkbox"/> 70 Kč		
večeře v so 10.10.	<input type="checkbox"/> 80 Kč		
ubytování v so 10.10. v pokoji	4lůžkovém <input type="checkbox"/> 200 Kč	3lůžkovém <input type="checkbox"/> 230 Kč	2lůžkovém <input type="checkbox"/> 250 Kč
snídaně v ne 11.10	<input type="checkbox"/> 30 Kč		

členský příspěvek ČES na rok 2010 Kč
dobrovolný příspěvek pro ČES Kč

kurz PC pro začátečníky (viz 2.strana)	<input type="checkbox"/> člen ČES/ČEM zdarma	<input type="checkbox"/> 150 Kč ostatní
--	--	---

Platbu uhradte do 31.8.2009 na účet číslo **195 230 825 / 0300** a jako variabilní symbol uveďte **xxxxx10012**, kde za xxxxx doplní členové ČES číslo legitimace (bez úvodního písmene kategorie) a ostatní doplní číslo popisné uvedené v adrese účastníka.

navýšení účastnického poplatku při platbě od 1.9.do 30.9. 2009	<input type="checkbox"/> 100 Kč
zvýšení účastnického poplatku po 30.9.2009 a při platbě na místě (platba na místě možná pouze při volné kapacitě)	<input type="checkbox"/> 200 Kč
Celkem k úhradě	
	Kč

Platba byla provedena dne **2009** v hotovosti poštovní složenkou nebo bezhotovostně z účtu č..... /

Uvedení data platby a případně čísla účtu nám umožní lépe spárovat platbu s přihláškou.

V dne 2009

_____ podpis

Vyplněnou přihlášku zašlete na adresu: Jiří Tomeček, Dr.Bureše 3, 370 05 Č.Budějovice
nebo e-mailem: Tomecek@esperanto.cz Prosím otočte a čtěte i druhou stranu!

